GISTO-OKT-2007
Redaktas G. Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

10101010101010101010101010101010101010101010101010101010101010

CHU LA TAJPISTA KAPO PANEIS?

Iam Gisto montris sxercan komparon de komputilo kun virino, ke kiam oni plej bezonas ilin, ili strikas kaj fusxas la programitan aferon. Tio okazas al mi nun. Ensxovigxis misfaro kiu malpermesas al mi skribi laù estis programite, du kolumnojn kaj mi ne trovas la gnomon kaùzintan la malhelpon. Sed, char estas la fina semajno de la monato, mi devas ne perdi tempon en la bakado de Gisto, tial mi daùrigas gxin sen divido en du kolumnojn.Ne restas tempo atendi ke doktoro teknikisto venu ordigi la kutiman skribmanieron.

9ª GAÚCHA RENKONTIGXO

Ech la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Geraldo Matos cheestis. Pluraj interesaj eroj okazis, inter ili texto de memorkapablo, elpensita de inst. Cezar. Gxi versxajne plachis al chiuj cheestantoj, tial inda je ripeto en alia evento. Domagxe,pro mia reveturebleco mi ne povis cheesti en la finaj eroj prezentitaj, inter ili recitado de poezioj, la ero kiun mi evaluas chefe interesa kiam E-evento okazas en publika ejo. Chiuj parkerigu ion interesan. Praktikado okazu inter ni rondanoj de la Verda Kafo.Bedaùrine kunvenis tro pokaj homoj.

LIBROFOIRO

Sxajnas ke vere GEA ne sukcesas ke iu budo sur la Placo almenaù montru platon kun la vorto Esperanto, por elmontri nian esperon ke iam la homaro farigxu racia, kontraù lingva hegemonio favora al demokratia kaj kultura diverseco.

GXENA DEMANDO

Plurfoje Gisto petis ke chiu el nia amikaro verku etan leteron al CHO-RO-I kun stimulaj frazoj, ke ni brazilanoj kontentas pro ilia valora kaj kuragxa laboro pere de China Radio Internacia kaj pere ilia jxurnalo MIKROFONE; letero al Marina Silva de la Ministério de Chirkaùmedio, kun peto ke sxi bv agi por ke la balenoj en la suda Atlantiko ricevu protektadon kontraù chasado kaj ekstermo chefe far japanaj barkoj; ke sxhi instigu sudamerikajn landojn helpi la konservadon de tiuj amindaj marbestoj taùgaj por enkasigi monon donacitan de turistoj,ktp. – Se la plejmultaj gaùchoj dormetas kaj pigras, esperantistoj estu diligentaj. Chiun leteron oni povas uzi por certagrade mencii la sintenon de Esperanto je la chirkaùmedia konservado, mencii la valoregan prezentadon de Al Gore rilate al la rapida varmigxo de nia Planedo (Cezar posedas KD) Eble li jam povas pruntedoni gxin al homoj kiuj volas spekti kaj, prefere, montri gxin al granda nombro da homoj ie en halo. – Karaj, se oni ne aktivas la “nepoj ne nin benos!” – Esti aktiva postulas iom da investo: tempo, laboro, mono kaj “fosfo”. La sama recepto validas por la prosperigxo de nia idealo.

ERINACO

Se vi ekvidas nekonatan vorton, kion vi faras? Chu vi turnas la pagxon aù chu vi turnas sin al vortaro? – Al vortaro? – Bonege, vi estas unu el la bonaj, unu el la diligentaj homoj. Vi estas gratulinda char el tiaj, domagxe ne ekzistas multaj en nia komunumo. Gratulon!

Nu, la titolo enkondukas temon okazintan dum la lasta lundo en mia hejmo. Ni posedas etan hundinon Nina chirkaù 18 monatojn agxa. Gxi estas tre tre scivola, ludema kaj tuj amikigxas al infanoj, nur ankoraù ne fidas nian nigran junan katon Karbo. Kvankam gxi sensukcese provas estigi motivon por ludi kun sxi. Nina ne havas rason difinitan, tre atenta sxi observas chion kio okazas en la korto. De kvin monatoj sxi vivas en nia familio kaj konkeris la koron de chiuj ni. Mia domo situas ekster la urbo, chirkaùita de arbaroj. Lundon vespere malkvieta sxi invadis la hejmon dum mi tajpadis chi tekston. Kiam mi atente alrigardis sxin klarigxis al mi kio grava okazis. Sxia muzelo ricevis enplanton de amaso da nadloj kaj sxi gxemis. Povra besto! Tuj mi alvokis mian filon Nej, ke li helpu min che la laboriga torturado, por elsarki la nadlojn.Prepare mi pretigis solvajxon el Tutokaina, anesteza rimedo.Manke de praktiko mi dubas chu la solvita procentajxo estis suficha. Kiam Nej alvenis mi sprucis sxian nazon kaj atendis kellakjn minutojn. Bonsxance, ene de la busxo ne trovigxis nadloj. Kiu iam cheestis tian turmenton ja scias kiom terure la laboro dispecigas la koron de la spektantoj.La besto, kun la faùko firme tenata ferma, sukcesis turmenti nin chiujn per mugxadoj. Multan sangon sxi perdis. Ni esperas ke neniu eta nadlo restis en sxia faùko kaj ke sxi lernis ne plu proksimigxi al tiuspecaj dangxeraj bestoj. Danke al Nej ni liberigis nian Nina el estontaj suferoj, kiam nadloj dise “vojagxas” tra korpopartoj.

DAùRAS LA DEMANDO...

Kio diferentas inter instruo kaj eduko? – Instruistoj, kelkaj, defendas ke ambaù sigifas la samon, eble pro tio ke, iliajn salajron pagas la Ministerio pri Edukado, n ela Ministerio de instruado. Okazas ke, se ni serchesploras inter popolanoj, chiuj opinias ke la eduko nepre komencigxu hejme, ekde la unua infaneco. Eduko komprenigas ke infanetoj lernu respekti siajn gepatrojn, fremdajn personojn, (knaboj)endome depreni la chapon ankaù je altabligxo, saluti pli agxajn homojn, etendi la dekstran manon kiam ili diras “bonan tagon”, ktp. resume, esti bomedukitaj, respektemaj junuloj. Tial chiuj bonintencaj periodajxoj kaj aùtoritatuloj vaste plendas: tiom da krimoj okazas pro manko de eduko (respekto), ne de instruo! – Pro la erara nomo “Ministério de Edukado...” multegaj gepatroj tute ne atentas pri la eduko de siaj etaj ribeluloj! Rezulto: lernantoj, kiam suferas riprochon, sputas sur la vizagxon kaj sxotas la gambojn de la geinstruistoj.- Salajro de geinstruistoj (tro minca) pagas por instrui la bazajn bezonojn de civitano: legi, kalkuli kaj aliajn necesajn lernobjektojn, neniel por rektigi malrektajn, fikutimojn de friponoj. El tio rezultas mankon de instruistoj, multaj rezignas – Mia persona opinio pri chi temo: la kaoson telegvidas fremdaj landoj, komercaj konkurantoj de Brazilo. Kie regas kaoso, tie okazas malkresko de produktado, okazas fusxajxoj, perdoj.

Por mildigi la pezan etoson, ridetu!VENENA REPAGO

- Kiom vi oldigxis, karulino mia! Mi preskaù ne rekonis vin.
- Verdire la samo okazis al mi. De dek jaroj ni ne intervidigxas kaj nur eblis rekoni vin pere de via vestajxo.

SONGXOJ – Edzo: mia edzino chinokte havis stultan songxon, ke mi estas milionulo. – Alia: Vi bonsxancas. Bildigu al vi mian problemon. La mia songxas la samon, veka.